# TAGIĜO

ESPERANTO-ASOCIO DE BRASÍLIA
SCS - Ed. Goiás - s/603
tel.: 225-4761
Caixa Postal 04-0406
70000 - BRASÍLIA - DF - BRAZILO

AŬGUSTO/SEPTEMBRO 1980


"TAGIĜO, TAGIĜO RADIAS EN' ROND'"
"LA OMBROJ DE NOKTO FORKURAS EL MOND'"

Verdire, ĉi foje la ombroj de nokto daŭris du monatojn kaj intertempe niaj mulmultaj legantoj sopiris al "Tagiĝo" ! Kulpis pro tio la ferioj, aŭ pli bone, la laboraj ferioj, kiujn niaj redaktoroj utiligis por vaste reklami nian Universalan Kongreson, ne nur en San Luis, sed poste en Stokholmo.

Tiurilate, oni flustras, ke pro la altaj prezoj en Svedujo, kelkaj el ĉiuj redaktoroj devis reveni... piede el Eŭropo kaj tio praviĝis la prokraston de nia bulteno.

## "ĜIS LA REVIDO EN BRASÍLIA !"

Tiuj estis la vortoj kiujn, centoj da fojoj, niaj ambasadoroj Carlos A. Cunha, Neima Adôrno kaj Enivaldo A. Silva, devis ripeti je la fino de la 65-a Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo. Laŭ la antaŭvidoj, amaso da eŭropanoj partoprenos venontjare nian kongreson en Brasílja kaj, por tiu interesiĝo, vigle kontribuis la informa stando pri Brazilo arangita en Stokholmo. En ĝi oni disdonis la unuan bultenon de la 66-a UK (eldonita de EMBRATUR en 30.000 ekzempleroj), disvendis la specialan glumarkon, invitis al spektado de filmo pri Brazilo (liverita al ni de la Ministerio pri Socia Komunikado), kaj respondis al sennombraj demandoj.

**HISTORIA MOMENTO EN STOKHOLMO**



La apuda bildo montras la ridetantan kasiston de LKK-Brasília kun granda pakaĵo en la manoj. Ne temas pri la mono de la aliĝ-kotizoj, sed pri la granda flago (fidela partoprenanto de ĉiuj Universalaj Kongresoj ek de 1939), kiu estos starigita en la salono de la Kongresa Centro en Brasília. Apud la kasisto aperas la prizorgantino de junularaj aranĝoj kaj la vicprezidanto de LKK. Ankaŭ ili ridetas, pormomente forgesante la grandan laboron, kiu atendos ilin la venontan jaron.. La flago estis transdonita de la prezidanto de LKK-Stokholmo, S-ro Lindblom (maldekstre). La foto aperis en revuo "Esperanto".

## FAVORA KONGRES-KOTIZO VALIDOS ĜIS LA 31/12/1980

Se kelkaj membroj de nia Asocio forgesis ĝis nun aliĝi al la 66-a Universala Kongreso de Esperanto, estos agrable por ili ekscii, ke la speciala tarifo de 70,00 nederlandaj guldenoj (ĉirkaŭ CR$ 2.200,00 laŭ la nuna kurzo), validos ĝis la fino de la jaro.

Por ĝui tiun avantaĝon, oni devos esti membro abonanto de UEA por la jaro 1981. La kotizo sumas je CR$ 1.300,00 kiujn oni povos pagi en la sidejo de la Asocio aŭ rekte ĉe la kasisto de LKK S-ro Carlos A. Siqueira da Cunha en la sidejo de BKE:

SCS - Edificio Jockey Club - sala 103

telefone: 226-1298

## ALIAJ INFORMOJ PRI LA 65-a UNIVERSALA KONGRESO EN STOKHOLMO

- Partoprenis la kongreson 1807 personoj el 52 landoj.
- El la 22 reprezentantoj de registaroj, 4 salutis en Esperanto. Por Brazilo salutis la konsulo Nunciato Santiago.
- Sveda Radio en portugala lingvo direktita al Brazilo, elsendis intervjuon kun la brazila delegacio pri la venontjara kongreso en Brasília.
- Kongresa ĉeftemo "Diskriminacio" estis debatita dum 30 horoj. La rezulta materialo estas tiel abunda, ke ĝi aperos en formo de aparta libro.
- Kiel nova prezidanto de Universala Esperanto-Asocio estis elektita S-ro Gregoire Maertens, 56jara belgo, ministeria konsilisto kaj docento pri impostoj en la financa altlernejo en Bruselo.

La ceteraj estraranoj estas: Renato Corsetti (Vicprezidanto kaj Landa Agado); Baldur Ragnarsson (Viceprezidanto kaj Kulturo); Flora Szabo-Felsö (Ĝenerala Sekretario kaj Planado); Ursula Grattapaglia (Informado kaj Delegita Reto); Elisa Kehlet (Kongresoj kaj Virina Agado); Petro Todorov (Faka Agado); Humphrey Tonkin (Esploroj, Edukado kaj Eksteraj Rilatoj).

## O MEU PRIMEIRO CONGRESSO UNIVERSAL

Ao participar do 65º Congresso Universal de Esperanto a primeira e espontânea impressão que senti foi: - "Meu Deus! O Esperanto funciona mesmo!" Não que tivesse alguma dúvida, mas quando conversamos, trocamos idéias e experiências com dezenas de pessoas dos mais variados países, sem nenhuma barreira lingüística, a agradável constatação pessoal da funcionalidade da Língua Internacional é uma grata surpresa.

E quando conhecendo a cidade, andando pelas ruas, encontrávamos alguém com o cartão de identificação do congresso, nunca pensámos: este é inglês, sueco, alemão ou búlgaro. Mas imediatamente: este é ESPERANTISTA!

Em Estocolmo a atmosfera era de eletrizante energia, dinamismo e grande participação de todos nos acontecimentos em geral.

A abertura solene com representantes diplomáticos, as palestras sobre diversos assuntos técnicos e culturais, a programação artística, o baile, os debates, a entrega da bandeira, a apresentação da nova diretoria, tudo enfim, despertava o máximo interesse dos participantes.

Também, mil ávidos olhos estavam permanentemente voltados para o estande brasileiro. O 66a UK, Brasília e o Brasil em si, fascinam o europeu pelo sabor de diferente cultura e exóticas novidades.

É, cada esperantista que se prepare: coração, razão e mãos! O 66a UK será uma experiência maravilhosa para nós, mas também significa muito trabalho para todos.

Mas... ah, participar de um congresso universal de esperanto... A par da experimentação e vivência irrefutáveis de que, de fato a Língua Internacional é uma concreta realidade, e ali, vendo, ouvindo, falando, tendo a comprovação racional da utilidade do Esperanto, há algo muito acima disso tudo: uma simples e irradiante magia: a atmosfera de solidariedade humana que vibra em todos, o forte sentimento de identidade ultrapassando todas as efêmeras barreiras dos convencionalismos mundados: crenças, status, cultura, partidos, valores. Sentimo-nos todos e cada um: homens que falam a mesma língua e com infinitas possibilidades de entendimento e comunicação autêntica.

Devo confessar, ainda, terei de fato captado nos congressistas um positivo sentimento de superioridade?! Não, é claro, aspectos desgastados de xenofobia ou exclusivismos. Mas a tranqüila segurança de quem sabiamente optou, aqui e agora, pela solução mais racional e viável da comunicação entre os povos.

E tudo isso desperta em cada um o desejo de fazer do mundo um definitivo Esperantujo...

Ou sendo isso uma meta a longo prazo, AO MENOS a cada ano visitar e e viver uma semana em Esperantujo...

Ah, já começamos a s o n h a r . . . .

Neima